

DUMONATA REVUO/TWEEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT

# Sonoro

65-a jaro, n-ro 1

januaro-februaro 1973

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

Oficiala organo de Belga Esperanto-Federacio, St. Bernardsesteenweg 1078,  
2710 Hoboken.

Poŝtĉekkonto: 1634.34 de BEF, Oude Donkiaan 83,  
B-2100 Deurne.

Prezidanto: D-ro Pol Denoël, Rue Victor Raskin 20, 4000 Liège.

Redakcio: Drakenhoflaan 97, 2100 Deurne.

Ĉefredaktoro: Fernand Roose

Redakcia sekretario: Paul Peeraerts

Krome kunlaboris al tiu ĉi revuo:

## FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO

Kapitalo: 142 005 BF aldonaj pagoj akceptataj pere de la pĉk 2914 29 de  
Maertens G., Brugge 3.

Donacoj al la fondaĵo pere de oficiala akto (ekz. per notaria akto) estu  
adresitaj al BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, asocio leĝa, por la  
fondaĵo. Antaŭdankon!

MET WELGEKENDEN  
MAGAZIJN VOOR MODERNE HERENKLEDING

**in't duifken**

GROTE KEUS  
IN GEREDE KLEDING.

KOSTUMEN · SPORTJASSEN · BROEKEN  
UNIFORMEN · GABARDINEN · JODENS  
STIJLVOL HAATWERK

KOEPOORTSTRAAT 64-66, ANTWERPEN

RABATO POR ESPERANTISTOJ

## ANDRE HECK MALKOVRIS KOMETON

La konata esperantisto el Liège, s-ro André Heck, kiu estas unu el la ĉefroluloj en la Someraj Universitataj Kursoj, la 11-an de januaro malkovris novan kometon. S-ro Heck havis la helpon de tri lieĝaj studentoj kaj de teknikisto de la observatorio Saint-Michel, s-ro Sause.

La kometo estis sekvata ekde sia malkovro dum pluraj noktoj por ke la sciencistoj povu elkalkuli ĝian orbiton. Temas pri kometo de dekdua grandeco.

## SUR LA KOVRILPAĜO

André Heck dum la laboro

(foto "La Meuse-La Lanterno")

## ĜENERALA JARKUNVENO

Ni havas la honoron inviti ĉiujn membrojn de Belga Esperanto-Federacio ĉeesti la ĝeneralan jarkunvenon kiu okazos sabaton la 17-an de marto 1973 je la 15-a horo en salono de la Suda Stacidomo, Avenuo Fonsny 47 bis, Bruselo. Oni petu la pordiston pri la Esperanto kunveno.

Sur la tagordo estas:

- morala raporto de la sekretario
- financa raporto
- aprobo de ambaŭ raportoj
- elekto de la proponitaj grupaj administrantoj

## "Dr. ZAMENHOFLAAN" EN BRUGGE

Jam antaŭ 1934 ekzistis en Assebroek (estinta antaŭurbo de Bruĝo) strato nomita "Esperantostraat" kaj tio dank'al iniciato de la formortinta fondinto de Bruĝa Grupo Esperantista: S-ro A.J. Witteryck, pioniro de Esperanto en Bruĝo, estis inaŭgurata en St.-Kruis (alia antaŭurbo) avenuo nomita "Esperantolaan".

Sekve al la kunfandiĝo de sep antaŭurboj kun la kerno Bruĝo, oni decidis modifi la stratonomojn duoble uzitajn kaj tiel endanĝerigis unu el la du Esperanto-stratonomojn.

Dank'al la klopodoj de la B.G.E. kaj tutspeciale de sia vicprezidanto, s-ro David Demeulenaere, la urbestro de Groot-Brugge decidis la 72-12-29 ŝanĝi la nomon de la Esperantolaan de St.-Kruis en "Dr. Zamenhoflaan" kaj lasi la nomon de la Esperantostraat en Assebroek neŝanĝita.

## PENSOJ PRI LINGVO KAJ KULTURO

Ekzistas eĉ dubo pri ĝuste kio estas kulturo kaj ĝuste kio estas lingvo. Sed kvankam inter lingvistoj, antropologoj kaj aliaj ekzistas malkonsento pri tiu demando, plej multaj specialistoj ŝajne konsentas, ke la du proksime interrilatas. Se lingvo koncernas komunikadon kaj kulturo-komunecon, lingvo ankaŭ dependas de *komuneco* de simboloj kaj pensmanieroj, kaj kulturo dependas de *komunikado* de spertoj.


Tra la jaroj, fakuloj esploris la efikojn de kontaktado inter lingvoj kaj kulturoj, kaj ili ekzamenis la manieron laŭ kiu eksteraj faktoroj premas sur parolajn aŭ kulturajn komunumojn, ŝanĝante aŭ detruante ilin. Tiaj komunumoj sin difinas centripete: iliaj fortoj rigardas enen. Kiam tiuj fortoj estas atakataj de ekstere, la unikeco de la komunumoj estas minacata, kaj kelkfoje la komunumoj finfine disflugas kaj dispeciĝas.

Kompreneble, la fakuloj interesiĝis plejparte pri la efikoj de lingva kaj kultura ŝanĝiĝo kiel objektivaj eventoj, kaj okazis malmultaj deklaroj pri la eventuala dezirindeco de tiaj ŝanĝoj — escepte en unu kampo, la rilato inter lingvo kaj nacieco, kie studoj de lingva normigo kaj la instruado de naciaj lingvoj ŝajnas antaŭsupozi, ke tia procedo plifortigas la ekonomian kaj politikan bonfarton de la ŝtato. De tempo al tempo pedagogoj, dezirante konservi la rajton de la infano al edukigo en la gepatra lingvo, levis siajn voĉojn favore al minoritataj lernejoj, kaj diversaj politikaj movadoj kaj organizoj celis disvastigi aŭ konservi la rajtojn de minoritatoj, kun diversaj gradoj de sukceso.

Je la internacia nivelo, la problemoj de "minoritatoj" ricevis malmultan atenton. Oni ne aŭdas ŝtatojn levi siajn voĉojn pro la grandskala detruado de kulturaj valoroj kaj la lingvaj komunumoj per sintrudo de la ĉefaj mondpotencoj, kun siaj evangelioj de sukceso kaj materia prospero, aŭ siaj iloj de milito kaj amasdetruo. La disputitaj teritorioj kaj enloĝantoj de Sudorienta Azio kaj certaj aliaj mondopartoj hodiaŭ devas submetiĝi ne nur al proprieta kaj homa ruiniĝo, sed ankaŭ al nuliĝo de imponaj kaj noblaj tradicioj kaj kulturaj valoroj. Iliaj historioj fariĝis aneksoj de la Okcidenta historio, ilia propra pasinteco englutiĝas en la avaron kaj stulton de fremduloj. Ni ofte forgesas, ke la aktivecoj de la grandaj potencoj ne nur la homan nuntempon, sed ankaŭ la homan pasintecon.

Ni devas do eltrovi kiel oni povas alporti la verajn avantaĝojn de okcidenta vivado al aliaj landoj, sen difekti tiujn landojn; kiel oni povas konservi lingvojn kaj kulturojn pro ili mem kaj por la bonfarto de iliaj gefiloj. Ni devas ekzameni la internaciajn moralon kaj motivojn de nacioj kiuj volonte elspezas monon je donacoj de armiloj por povigi unu malgrandan nacion militi kontraŭ alia, kiuj fanfaronas pri la eksporto de bildstriaĵoj kaj libretoj kaj luksaj hoteloj aŭ kiuj elbuŝigas ideologiojn por pravigi ĉiajn specojn de subpremo aŭ egoismo, sed kiuj ne kapablas kompreni, ke alilandanoj ne estas ludiloj sed homoj, alilandaj kulturoj ne anakronismoj sed vivanta estaĵo.

H. Tonkin



## 4-a B.E.F. — karavano al la suno

Tri fojojn la B.E.F.-karavano jam veturis tra parto de Eŭropo por ĉeesti universalan kongreson; tri fojojn la gepartoprenantoj plene kontentiĝis. Nun BEOGRAD nin alvokas: sed ne nur la kongresurbo interesigas nin, la tuta lando estas paradizo por la vizitanto.

Jen provizora programo por 21-taga rondvojaĝo:

*Lundon 1973-07-23:* foriro el *Bruĝo*, laŭ *Gento*, *Bruselo*, *Lieĝo*, *Heidelberg*, *Ulm*, *Zell-am-See*, *Grossglockner Hochalpenstrasse* (vizito), *Ljubljano* (unutaga restado kun vizitoj). Alveno en *Beograd* vespere de vendredo la 27-an.

*Sabaton 1973-07-28:* ĝis *ĵaŭdo 1973-08-02 (matene):*

Ĉeesto en la 58-a kongreso en Beograd kun jenaj eblecoj rilate al la loĝado:

- 1) mem zorgi pri loĝado, ĉu pere de la LKK, ĉu persone, sed atentu, nur por 6 noktoj (de vendredo vespere 73-07-27 ĝis ĵaŭdo matene); ne enskribu por ekskursoj de la ĵaŭdo 1973-08-02 ĉar ni forveturas matene!
- 2) loĝi kun la karavanoj en mezklasa hotelo apude de la kongresejo (duonpensiona = tranoktado + matenmanĝo kaj vespermanĝo) kun la aŭtoĉaro je nia dispono; informoj ĉe la subskribanto.

*Ĵaŭdon 1973-02-08:* foriro el *Beograd* por grandioza ekskurso tra Jugoslavio: *Sarajevo* (vizito al la famaj bazaroj kaj al la vendejo, la turka domo, moskeoj ktp. dum restado de du tagoj) *Kotor*, *Dubrovnik*, *Mostar*, la marbordo (kun unutaga restado) *Split*, *Plitviĉe* (lagoj) kaj *Zagreb* (unutaga restado).

*Vendredon 1973-08-10:* reveturado laŭ *Maribor*, *Salzburg*, *Nürnberg*, ktp. Alveno en Bruĝo dimanĉon la 1973-08-12.

Oriento kaj okcidento, kruda pejzaĝo kaj ĉarmaj marbordoj, turkaj konstruaĵoj kaj romaj ruinoj; la B.E.F.-karavano prezentas ĉion al vi kiel en kalejdoskopo.

**Kondiĉoj:** 16 tagoj en unuaklasaj hoteloj sen kromaj kostoj — krom la sestaĝa restado en la kongresurbo — inkluzive de ĉiuj vizitoj, gvidantoj, broŝuro kun la tuta detala programo, eĉ ĉambro kun bano en la plej sudaj loĝlokoj por 11 000 F (+ 600 F por unu-persona ĉambro kie tio eblas).

**Enskribo:** la enskribo okazas nur per la pago de 2 000 fr. je la poŝtkonto 2914 29 de G. Maertens, Brugge 3.

Oni povas enskribi por la dua parto de la vojaĝo, do ekde ĵaŭdo la 1973-08-02 ĝis la 1973-08-12.

**Pliaj informoj:** B.E.F.-karavano al la 58-a kongreso, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio.

## LA MANIPULATA HOMO

“La manipulata homo”, jen la temo de la ĵus okazinta 16-a Internacia Seminario de GEJ kie 12-kapa delegacio el nia lando ĉeestis. Verki kompletan raporton pri tiu ĉi evento ni ne povas, sed certe indas citi kelkajn faktojn:

- Kiel ĉiam dum la pasinta jardeko, la belga delegacio konsistis el nur antverpenanoj. Ĉu la aliaj grupoj ne volas prezenti al siaj gejunuloj altnivelajn feriojn aŭ ĉu tiuj gejunuloj ne plu ekzistas?
- La antverpenan grupon karakterizis multe da esperantado, malmulte da krokodilado (precipe sub la bona influo de la ge-Haazen-oj kaj ties infanoj); tre fruega ellitiĝo dank'al (aŭ ĉu maldank') al la bruegado de tiuj ĉi lastaj kaj fruega enlitiĝo sekve de tio; tre granda amika sento (ofta kaj volonta infanvartado; interŝanĝado de ĉiaj piloloj kontraŭ malvarmumo kaj gripo; malsanulflegado ktp.).

La sukceso de tiu ĉi grupa vojaĝo al Germanujo kaj la sukcesplena tiea restado certe estis bona stimulo por daŭrigado de tiaj aranĝoj, kaj ankaŭ havis bonan efikon sur la Esperanto-vivon en Antverpeno.



Sur la foto kelkaj gajaj vizaĝoj de ok diversaj nacioj dum spontanea kantvespero.

## NOVA KONKURSO DE LA POLA RADIO

Oni solene festos dum ĉi tiu jaro historiajn datrevenojn de la pola scienco: la 500-an de la naskiĝo de Nikolao Kopernik, la 200-an de la kreo de la Komisiono por la Nacia Edukado — la unua en Eŭropo edukministerio, la 100-an de la Pola Akademio de la Scioj. En ĉi tiu jaro okazos la II Kongreso de la Pola Scienco.

Lige kun tio ĉi ni turnas nin al vi kun la peto respondi al la jenaj demandoj:

- Kiujn atingojn de la polaj sciencistoj vi konas? Kiujn el ili kaj pro kio vi pritraktas plej alte?
- Bonvolu menci i la konatajn al vi faktojn pri la partnereco de Pollando en la internacia scienca kaj teknika kunlaboro.
- Kiuj personoj de la pola deveno partoprenis en la evoluigo de la kulturo kaj civilizacio en via lando?

La aŭskultado al la elsendoj de la Pola Radio faciligos al vi respondi la suprajn demandojn. La respondo al almenaŭ unu el ĉi tiuj demandoj rajtigas partopreni la lotadon de la premioj.

La konkursaĵojn oni sendu al la adreso: Polskie Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio-1, P.O. Box-46, Pollando, en kovertoj signitaj per la vorto *konkurso* estos anoncataj la 15-an de aprilo de la 1973-a jaro. Al la partoprenantoj de la konkurso estos atribuatataj multaj premioj: 10-tagaj ekskursoj tra Pollando, premioj kaj suveniroj.

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefpremioj okazos en periodo indikota de la Pola Radio.

POLSKIE RADIO – WARSZAWA

## LA KONGRESO EN LUKSEMBURGO

**Kroma sciigo:** Ni ekscias ke al la Eŭropa Kongreso en Luksemburgo estos organizata trajna grupvojaĝo el Antverpeno kaj Bruselo je rabatita prezo. Informojn oni povas akiri de s-ino Imelda Haazen-Wuyts, Groenstraat 12, B-2510 Mortsels (tel.: 03/40 07 76).

## LA ESPERANTO-BALO EN ANTVERPENO

Tiun ĉi jaron la Esperanto-balo okazos sabaton la 5-an de majo je la 20-horo en la sama ejo kiel pasintjare, nome en Van Rijswijck, Van Rijswijcklaan 193, Antverpeno. Kartoj estas nun jam akireblaj kontraŭ 50 kr. aŭ 100 fr. (subtenantoj), pagendaj al la pĉk. de “La Verda Stelo” n-ro 726 54. Ne maltrafu tiun ĉi okazontajon!

# BIBLIOGRAFIO



**D-ro Werner Bormann: "Bona Ŝanco" = dekdu prelegoj kun aldono de dokumentoj. Eldonis "Stafeto" sub gvidado de Prof. D-ro J.R. Perez en La Laguna de Tenerife, sur la Kanariaj Insuloj. En la serio "Movado" n-ro 5/ 247 paĝoj. Prezo: 3.60 Us.Dol.**

Mi legis ĝis nun tri recenzojn. Unu, el nacia revuo, menciis entute la neĝustan uzon de "nur". Alia, en internacia revuo, diris ĝeneralajojn pri konvinkaj argumentoj por la taŭgeco de Esperanto. Tio estas mal-inda. Mi komprenas ke spaco mankas. Sed en tiu kazo oni nepre donu la esencon de tiu vere rimarkinda libro.

Preskaŭ la tuta serio de prelegoj estas respondo al la demando kiun ni mem tuŝis en kelkaj lastaj numeroj de nia "Sonorilo": kaj la venko de Esperanto? ... por kiam? Sed la aŭtoro pritraktas ĝin ĝisfunde, kun "Deutsche Gründlichkeit". Eble skeptikuloj pensas ke la titolo per si mem montras aŭ naivecon de la aŭtoro aŭ mem perforton, se li parolas pri bona ŝanco por Esperanto. Sed la tezo estas ke tiu bona ŝanco estas efektive realaĵo... por la estonto. En la estinteco la internacilingva problemo estis (ĉiufoje) solvata ĉu per la latina lingvo (16a kaj 17a jc.) ĉu per la franca en la 18a jc. Nun, en tre ŝanĝitaj cirkonstancoj, tiu problemo relevas sian kapon... kaj estas nesolvata. Tion pruvas la fakto ke la latina kaj la franca estas anstataŭataj ne per unu aŭ alia lingvo, sed per pligrandiĝanta nombro da aliaj lingvoj. Kaj ĝuste en tio kuŝas la nesolvado de la problemo. Multegaj personoj pensas ke la problemo estas tamen jam sur la vojo de la solvateco pere de la grandegaj influo kaj disvastiĝo de la angla lingvo, kaj ankaŭ pere de la moderna tekniko (la komplika kaj multekosta aparataro). Tiuj multegaj personoj fakte ne vidas kiel komplika iĝis la problemo pro la faktoj de la teknika unuiĝo de la tuta mondo, kaj de la kultura altniveliĝo de la nacioj kaj de ĉiuj klasoj de la socio. Malfeliĉe, malmulte helpas diri tion al ili. Ili devos esti instruitaj de la sperto. Do kiam la homaro vidos ke neniu nacia lingvo nek iu ajn teknikaĵo alportos la solvon, tiam prezentiĝos la bona ŝanco. Intertempe — la aŭtoro akcentas tion — ni en nia pacienca laboro devos plu evoluigi kaj la lingvon (literaturo; lingvopraktikado) kaj la movadon (organizado; servoj). Mi citas frazon de p. 44: Nur se la ĝenerala Esperanto-vivo bone floras, ni povas prave aserti ke ni kapablas solvi la mondlingvan problemon". Ĉion tion la aŭtoro demonstros per faktoj el la nuntempa internacia vivo (ĉu scienca esplorado, ĉu politiko k.a.) kaj per perforta logiko, por fine alveni al konkludoj ofte esprimitaj en unu frazo, frazoj kiujn oni povas karakterizi kiel ideologiajn bazojn de la Esperantismo. Legu laŭ kiu vojo li venas al la tezo-kiu efektive estas unu de la fostoj de nia ideologia konstruo —:

Mondlingvo nur estas imagebla kiel politike neŭtrala.

Dum legado de la libro oni konstatas ke "Bona Ŝanco" estas arsenalo de argumentoj por nia afero "en la nuna evoluo de la homaro". Mi insistas pri tio lasta. Efektive, la ŝanĝiĝoj en la kondiĉoj en la situacioj, en la evoluo, devigas nin konstante al re-pripensado de la problemoj. Ja la samaj problemoj de la vivo de la homoj prezentiĝas ĉiufoje en ŝanĝitaj vivkondiĉoj.

La aŭtoro pritraktas ankaŭ la faman peticion de 1 miliono da individuaj subskriboj kaj de 3 843 organizaĵoj en la nomo de 72 milionoj da ĝemembroj, adresitan al la UNO en 1966. Post bonvola akcepto de donacoj (i.a. la luksa eldono de la Dia Komedio) la sekretario de la sekretariato metis la ampleksan dokumenton... en forgesojn (!) kaj deklaris ke li nenion povas fari per, por kaj pri tiu peticio (!). Nu D-ro Bormann donas pri tiu stranga evento klarigon pri kiu la minimumo kiun mi povas diri estas... ke mi ne atendis ĝin! Nome, ni, la esperantistoj, timigis ilin, la ŝtatpotenculojn! Mi legis kaj relegis por esti certa ke mi ne eraris. Sed jen, sur p. 169 troviĝas i.a. jena frazo: Sed certe ni jam timigis per tiu demonstracio de nia forteco la respondecajn politikistojn kaj administrantojn de la grandaj ŝtatpotencoj reprezentataj en la UNO." Nu, malgraŭ ke tio povas ŝajni ne verŝajna, tamen ekzistas argumentoj favoraj al tia klarigo. Estas ja sufiĉe konate ke la potencaj ŝtatoj praktikas diversspecajn imperialismojn kaj ankaŭ lingvan imperialismon. Memoru la vojaĝon de De Gaulle en Kanado; la deklaron de Pompidou en nia lando. Ankaŭ la pritrakton de tia imperialismo ni trovas en la libro. Sed rilate tiun peticion mi havas alian konsideron kaj sugeston.

La UNO havas la devon informi siajn ŝtatojn-membrojn pri ĉiuj envenintaj (gravaj) peticioj kaj similaj aferoj. (Ĉu ni ne aŭdis altrangajn UNO-personojn emfazi ke tiu organizaĵo volas havi atentan orelon je la deziroj kaj esperesprimoj de larĝaj tavoloj de la homa socio?). Nu, inter tiuj kiuj subskribis la peticion, troviĝas kelkaj kiuj povus demandigi siajn registarojn, kaj eĉ kelkaj kiuj mem povus fari al UNO iujn trafajn demandojn; ekz.: ĉu vere ke envenis iu peticio... Ĉu la UNO povas doni detalojn de tiu peticio? ... Kiel povis okazi ke post pli ol kvin jaroj, ni, ŝtatoj-membroj ne ankoraŭ estas informitaj? ...kaj tiel plu. Mi konscias ke tiuj "samideanoj" per tia ago, troviĝus en iu antaŭbatalfronto. Sed en tiu-ĉi kazo mi enviciĝas en la grupo de samopiniantoj de nia amiko Hector Boffejon, ke mi devas ankaŭ ataki kaj batali. La bruo kiun tia ago okazigus certe ne estus malbona por nia movado. Ne argumentu ke ĝi akriĝus la malfavorajn sentojn de tiuj UNO-administrantoj kaj ŝtatpotenculoj; la sentoj de tiuj personoj estas ĉiukaze malfavoraj je ni. Do.

Mi nun konstatas ke per tiu konsidero la recenzo iĝis iom longa por nia neampleksa "Sonorilo". Sed eble mi jam sufiĉe montris la grandan valoron de la libro. Se vi nun ekscias ke ĝi havas jenajn aldonajn dokumentojn: 1) reguloj pri la lingvouzo en la Eŭropaj unuiĝoj (t.e. en la Eŭropa Ekonomia Komunumo por Karbo kaj Ŝtalo en la Comecon; en la Eŭropa Liberkomerca Asocio (=Efta); en la Eŭropa Konsilantaro kaj en la Eŭropa Kortumo por Homaj Rajtoj). 2) la Diskutado pri Esperanto en la Germana Radio en 1965; kaj, trie, raporto pri la rezultoj de la iama International Auxiliary Language Association, tiam vi ne plu povos dubi pri la neceso posedi tiun verkon.

F. Roose

## EN LA ESPERANTA GAZETARO

Reaperis post plurjara silentado "La Verda Lupeo", organo de la Esperanto-Ligo Filatelista. Tiu ĉi sepa numero precipe estas dediĉita al novaj Esperanto-poŝtstampoj kiuj estas akireblaj ĉe la ligo. Adreso: Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau, Germanujo Okc.

Denove aperis "Kristana Esperanto-Revuo", komuna numero de "Dia Regno" kaj "Espero Katolika". Ĉefartikolo, ja tipa por tiu ĉi komuna numero, estas "La Rilatoj inter katolikaj kaj protestantaj esperantistoj" de H.A. de Hoog. La artikolo estas mallongigo de parolado en la kongreso de I.K.U.E. en Como. Krome oni trovas en la revuo "Ekumenaj Informoj" kaj "Ĉu Ekumena komitato malvivas".

Sub la titolo "Neŭtraleco kaj Perspektivoj", Renato Corsetti (prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Asocio) en la unua numero de "Heroldo" ĉi-jara donas interesajn faktojn pri la agadmaniero de TEJO rilate la neesperantistan mondon.

Dum ceremonio okazinta pasintjare en la Universitato de Fort Lauderdale (Usono), oni atribuis al prof. dr-ro Ivo Lapenna la titolon de doktoro honoris causa pro internaciaj rilatoj pro liaj sciencaj esploroj en tiu sfero, inkluzive la studojn pri la lingva demando en la mondo. En sia parolado, prof. Lapenna prezentis la evoluon de internaciaj rilatoj kiel akademia studobjekto. La lasta parto en kiu estas pritraktata la rolo de la Internacia Lingvo, estis la ĉefartikolo de la unua ĉi-jara numero de "Esperanto" de UEA.

## EL LA NACILINGVA GAZETARO

Antaŭvide al programo en la franca televido pri Victor Lebrun, lasta privata sekretario de Tolstoj, "Le Soir" publikigis artikolon en kiu oni mencias ke ambaŭ, Lebrun kaj Tolstoj fervore amis Esperanton.

Laŭ "Journal et Indépendance" Slovena Esperanto-Asocio enketis pri la deziro al oficialigo de Esperanto de oficialuloj, lernejoj, ktp. La rezultoj estas mirigaj: 60 urboj subtenas la oficialigon kaj preskaŭ 500 lernejoj subtenas la enkondukon de Esperanto en sia instituto.

"Le Jour" dediĉis longan artikolon al la pensumiĝo de la prefekto de la Reĝa Ateneo de Eŭpeno. Ĝi citas ke la konata kanto "Ĝis revido" estis kantata en Esperanto kaj ĝi publikigas krome foton de la granda Esperanto-klaso.

Laŭ "De Standaard" ok personoj kun malsama nacieco planas fari vojaĝon ĉirkaŭ la tero en velŝipo. La nura lingvo estos Esperanto. Celo de tiu ĉi entrepreno estas pruvi ke nia lingvo ankaŭ en tiaj cirkonstancoj taŭgas kiel komunikilo.

Sub la titolo "Jurons standardisės", la revuo "Belgian Business" (legata de ĉefrespondeculoj en industrio kaj komerco) publikigis artikolon en kiu oni ridindigas Esperanton. Pri la Universala Kongreso en Portland ili diras la jenon: "Trideko da Esperantistoj arigis tuj-tuj en Usono por kompili liston de insultoj. Ĝis nun neniu estis konstatinta ke tiaj vortoj tute mankis (!) ..."

## DISE EN LA MONDO

La monda firmao Agfa-Gevaert (34 000 kunlaborantoj) kun sidejo i.a. en Leverkusen (Kolonjo, Germanujo Okc.) ĉiun jaron havas jarkunvenon kun gazetara konferenco. "Photo-Weekly", grava usona ĵurnalo pri fotografio protestis en longa artikolo akre kontraŭ la fakto ke german-belga entrepreno sur germana teritorio ne uzis la anglan kiel laborlingvon.

La aŭtoritatuloj de la aŭtovojo Torino-Milano (Italujo) eldonis kvinlingvan informilon, nome en la itala, franca, germana, angla kaj esperanta.

"Baha'i: La Mondkredo por la Nuntempa Homaro" estas nova 22-paĝa broŝuro havebla senpage ĉe S-ino Roan Orloff Stone, 504 North Fifth Street, Gallup, New Mexico 87301, Usono.

En "Unesco Informatie" eldonata de la Ministerio pri Nacia Edukado kaj Nederlanda Kulturo aperis en sinsekvaj numeroj diversaj artikoloj pri Esperanto. En la nunaj numeroj aperas enkondukita konciza kurso pri la internacia lingvo. La revuo estas sendata al ĉiuj lernejoj kaj al petantoj. Adreso: Ministerie van Nationale Opvoeding en Nederlandse Cultuur, Administratie van Internationale Culturele Betrekkingen, Unesco, 8ste verdieping, Kortenberglaan 158, 1040 Brussel.

En la duonmonata revuo "TOP" por gejunuloj inter 14 kaj 18 jaroj en 20 sinsekvaj numeroj aperas Esperanto-kurso. Se ekestus sufiĉe da intereso, la eldonejo "Altiora" (Averbode) ankaŭ aperigos perfektigan kurson. Krome oni publikigas regule novaĵojn el la Esperanto-junularmovado.

# El Popola Ĉinio

Esperanta Monata Ilustrita  
Specimeno akirebla senpage

**ABONTARIFO:** 1 jaro 80 FR.  
2 jaroj 120 FR.  
3 jaroj 160 FR.

## ABONU: Ĉe

Eldonejo — Librejo "SONORILO"  
Kerklaan 61  
8000 BRUGGE  
Pĉk.: 1521.40



Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

**J. VERDYCK & Co** Pvb.

**ANTWERPEN, Lange Nieuwstr. 30**

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

## **FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN**

P. V. B. A.

St.-Bernardse steenweg 631  
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -  
„securit“ vitro  
kolorigitaj vitroj  
aluminiaj senmastikaj  
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por  
tutvitra-konstruaĵoj  
mastiko

**Telefono 272875**